

Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 2002

73-a jaro, n-ro 1 (1159)

ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem


MENSUEL/MONATA

<http://www.sat-esperanto.org/> *** **retadreso: satesper@noos.fr**

- Lastmomente-

Grava bato por S.A.T.

FORPASIS KAMARADO IVO



La 5-an de januaro 2002, forpasis en sia 68-a jaro, la prezidanto de la Plenum-Komitato de S.A.T. - k-do Ivo PEYRAUT. Tiu ĉi informo atingis nin kiam Sennaciulo estis presopreta. En la februara numero ni dediĉos pli da spaco al nia forpasinta kamarado.

EN
ĈI NUMERO :

Manifestacio
en Bruselo, p.3

Milito en
Afganio, p. 5

Lingva
diskriminacio
en Alĝerio, p. 6

Paco, p. 7

Izolece, p. 12

Milito estas
plago, p. 5-6

Kongresaliĝilo,
p. 15-16

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj, kiel vi povas legi en la paĝo 9 de ĉi tiu numero, la malsaniĝo de la prezidanto de la P.K. estas grava bato por ni ĉiuj. Sed malgraŭ tio, la funkciado de nia Asocio devas daŭri. Tion ni povas efektiviigi dank'al via helpo. Do, kunlaboru en Sennaciulo kaj sendu al ni informojn kaj proponojn por la aktivado. La aktiveco de la Asocio ne dependas de ok kamaradoj de la P.K. sed de ni ĉiuj, de vi, SAT-anoj. Ĝis nun la P.K. plenumis ĉiujn decidojn de la kongreso en Nagykanizsa. Sed, antaŭ ni staras pluraj taskoj - aperigo de nova PIV, kongreso en Alicante, batalo favore al Sekvojo kaj grupo Portos, ktp. Aktivu laŭ viaj ebloj en tiuj agoj kaj proponu aliajn. Varbu al SAT novajn membrojn, ĉar ni bezonas novajn ideojn kaj novajn fortojn. Dezirante al vi ĉion plej bonan en tiu ĉi nova jaro 2002, restas kamaradece via,

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.com>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30;

de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster

la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut,

P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT

Abonnement annuel/jara abono France 51,70 €

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Oferto de "LAŬTE!" al novaj abonantoj por jaro 2002-a

Al tiuj, kiuj deziras provi unujaran abonon en jaro 2002-a, **Laŭte!** ofertas:

* sep normalajn n-rojn (de januaro 2002 ĝis januaro 2003);

* du literaturajn suplementojn:

Tradiciaj rakontoj (broŝuro ilustrita per kompaktdisko registrita de pluraj "gelaŭtuloj");

Bildoj el la folkloro kaj tradicio argentinaj (traduko kaj prezento de Magistro Eŭgo, eld. en 1999);

Aldone:

* la adresaron de la abonantoj kaj la detalan katalogon de la nun disponeblaj titoloj ĉe SAT-broŝurservo.

Jarabono: 14 Eŭroj (17 Eŭroj por sendo aviadila)
7 Eŭroj, por donaci tiun abonon al nepagipova amiko.

Adreso: Cercle amical espérantiste, FR-47470 Beauville
Poŝtkonto: BOR 3371 74 M, Francio.

ATENTIGO AL NIAJ NORVEGAJ MEMBROJ !
Kamarado Per ENGEN, nia landa peranto, havas novan adreson. Jen ĝi:
Per ENGEN
Østregate 14
NO-2317 HAMAR
Norvegio

NOVA PERANTO EN ITALIO

Ni havas novan peranton, kiun ni elkore bonvenigas. Jen la adreso:

Carlo BOURLOT, Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO).
Tel: 011-3970477 (vespere ĝis 23h.)

Rete: <s.bourlot@tiscalinet.it>

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Partopreno de SAT-anoj okaze de la Eŭropa Supro en BRUSELO

dum la aliaj tagoj kaj samtempe okazis en okcidenta parto de la urbo internacia anarkiista manifestacio. La plej ĉeestantaj movadoj estis FAU, SAC, CNT kaj poste kelkaj pli marĝenaj kiel la nia.

Djemil, Renato kaj mi forlasis Parizon la posttagmezan vendredon 14an de decembro sentante sin kvazaŭ delegitoj de aliaj kiuj ne havis la oportunecon liberiĝi. La vetero estis bela kun temperaturo subnula. Alvenintaj en la belgan ĉefurbon ni rendevuis kun la loka SAT-grupo en la persono de nia k-dino Klementine kiu zorge montris nian loĝejon kaj gvidis nin en la urban centron. Ĉiu ricevis dosieron komponitan el la lasta kajero Esperanto Info kaj detaloj

lingvo kun resumo en nederlanda. Ni restis sufiĉe longtempe por aŭskulti plurajn asociojn inter la 80 anoncitaj. Krom la kutimaj, venis delegitoj de asocioj por Palestino kaj Kamerunio kiuj alparolis la Eŭropajn ŝtatojn cele ke ili ĉesu siajn hipokrita-



Aludo pri la baldaŭa alveno de eŭro



Sindikatoj kaj asocioj aktive partoprenis

jn politikojn.

Komence de la posttagmezo ĉiuj grupiĝis por partopreni la stratan manifestacion nomitan "Marŝado por la paco" kaj ni havis la surprizon renkontiĝi kun k-do Bruno el Thionville. Lia helpo por tenado de la SAT-standardoj estis

bonvena (mi aldonas, ke

Niaj flugfolioj estis bone akceptitaj kaj post la fino de la demonstrado inter placo Shuman kaj Pordo de la 50-jariĝo ni jam konsciis ke grava parto de la varbado troviĝas meze de tiuj bolantaj agoj. Ni devas dediĉi pli da fortoj kaj ankaŭ havi taŭgan materialon. La nunaj eventoj montras ke la unua paragrafo de nia statuto restas ne nur aktuala sed ankoraŭ avangarda kaj aplikenda. Frostorigidaj, ni eniris trinkejon por bilanci kaj gratuli niajn k-dinojn Klementine kaj Stella antaŭ la tuja forveturo Parizen. Ĝis venonta agado.

Guy

de la sabataj aranĝoj kun la necesa urba plano .

Sabaton la 15an matene Klementine akompanis nin ĝis ULB (Belga Libera Universitato) situata en sudorienta parto de Bruselo. Jam surloke niaj gek-doj Stela el Antverpeno kaj Klaŭdo el Bruselo ĉeestis. La unua amfiteatro estis rezervita de la movado Socialista Internacia Rezisto. Kelkaj el ni eniris por sekvi la debatojn sed pro pezaj lingvaj tradukoj rezignis . La disdonado de niaj seslingvaj flugfolioj estis pli motiviga kaj riĉa de personaj kontaktoj.Tiel ni konatiĝis kun juna SAT-ano Mikaelo el Hamburgo. En la dua amfiteatro la paroladoj de la delegitoj okazis en franca

nun Bruno rolas kiel OKK-prezidanto en la preparo de la SAT-Amikara kongreso kiu okazos en Vigy de la 30/03/02 ĝis la 02/04/02). Ĉar estis la lasta tago de tiu supro la procesio arigis malpli da personoj ol



Feliĉe la policistoj ne tro intervenis